

# REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

*movada revuo en kunlaboro kun REU*

*№ 2 (51) aprilo 2009*

*E-movado en Uljanovsk prosperas*



*en la numero*

*VER, TEMoj kaj aliaj estontaj aranĝoj*

*LF en Uljanovsk kaj Peterburgo*

*nacia frazeologio E-veste*

*raport-reelekta Konferenco de REU*

*novaj libroj de "Impeto"*

*"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia*

***Moskvo, 2009***

## enhavo:

- 01 VER-14
- 01 Tihvinaj Esperantistaj  
Metiejoj invitas vin
- 02 La sepa LF en Uljanovsk
- 04 La tria LF en Peterburgo
- 05 "Apero-4": kio nova?
- 08 Uljanovskaj esperantistoj  
festas...
- 10 Centjara jubileo de Boris  
Sokolov
- 12 Rusaj esperantistoj en Aŭstralio
- 14 Testo pri pluralismo
- 15 Nacia frazeologio E-veste
- 19 Raport-reelekta Konferenco de  
REU
- 19 Prezidanta raporto
- 22 Malferma letero al REU-  
Konferenco
- 24 Generaloj sen armeo
- 25 Membrostatistiko de UEA en 2008
- 25 Membrostatistiko de REU
- 25 Novaj REU-membroj por 2009
- 27 Kotizoj de REU/REJM por 2009
- 28 TEJO informas pri estontaj  
aranĝoj
- 28 E-kurso en Surgut
- 29 Kultura Esperanto-Festivalo
- 30 Printempa renkontiĝo en Hanojo
- 30 Esperanto sur 64 milionoj da  
balotiloj
- 32 Libroservo de UEA vendis por  
125125 eŭroj
- 33 La urbo Goblinsk (nova ĉapitro)
- 38 Novaj versaĵoj de Klara Ilutoviĉ
- 40 "In memoriam..."
- 24, 29, 31 Anekdotoj
- k3 Funebra sciigo el Latvio
- k4 Novaj libroj de "Impeto"



LF en Peterburgo

## **REGo**

**(Rusia Esperanto-Gazeto)**

**Nº 2 (51) aprilo 2009**

*aperadas ekde 2000*

**redaktas** Garik Kokolija  
**kunredaktas** Viktor Aroloviĉ  
**kunlaboras** Maksim Grišin

*materialoj de REGo povas esti  
represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos  
senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto*

*poŝta adreso:* Pjaticnikoje ŝosse 45 – 105  
125310 Moskvo, Rusio  
*retadreso* <gazeto@mail.ru>

### **abontarifoj por 2009:**

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj  
de KŜŜ – 300 rubloj sendendaj al:*  
Коколия Георгий Владимирович  
Пятницкое шоссе 45 – 105  
125310 Москва

*por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj  
pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*



*Ljonja Borisov*

Tiu birdo malica  
Ja ne havas preferon –  
Eble mi estos vica,  
Kiu lasos la Teron.  
Sed fieros kun beno  
Mi ĝis la vivofino,  
Pri la verda ĝardeno –  
Nia glora destino.

***Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin)***



*Olga Semjonova*

### **FUNEBRA SCIIGO EL LATVIO**

Kun granda malĝojo en la koro mi anoncas, ke la 2-an de aprilo post longa kaj malfacila malsano en Rigo forpasis estrarano de Latvia Esperanto-Asocio, konata latva esperantisto Aristids Medinš (nask. 31.08.1944). A.Medinš estis longjara aktivulo de Latvia Esperanto-movado, organizis multajn Esperanto-aranĝojn, inter ili ankaŭ la popularan printempan renkontiĝon “Neĝfloketo”, gvidis la Esperanto-klubon “Radieto”, okupiĝis pri eldonado de Esperanto-libroj, glumarkoj, insignoj k.a., estis membro de la redakcia komisiono de “Latvia Esperantisto”. Dum pli ol tri jardekoj li estis individua membro de UEA, Delegito por Rigo. Lia morto estas grandega perdo por Latvia Esperanto-Asocio kaj por ĉiuj, kiuj konis tiun ĉi sinceran, amikeman kaj modestan homon.

***Margarita Želve, prezidantino  
de Latvia Esperanto-Asocio***


*Multaj malnovaj  
esperantistoj el Rusio kaj aliaj  
landoj de eksa USSR tre bone  
konas Ariston kaj memoras  
lian bonkoremon kaj aktivan  
agadon ankoraŭ dum la  
sovetia tempo (en 1970-73 kaj  
1977-79 li estis komitatano de  
SEJM). Lia forpaso estas  
granda ĉagreno ankaŭ por niaj  
koroj. (La redakcio)*



*Aristo Medinš kun la filino Alise*




## Novaj libroj de “IMPETO”



*István Nemere. Jesa.* Originala romano. – “Impeto”, 2009. – 184 paĝoj.

En malgranda urbeto, kiu situas rande de dezerto, post sabla tempesto aperas stranga virino. Iuj opinias ŝin nova Mesio, aliaj – pseŭdoprofeto, eĉ fripono. Ŝi allogas dek du disĉiplojn, preferante elekti el la plej malestimataj urbanoj. Ŝiaj adeptoj iĝas la loka Casanova, trompisto-almozulo, bubo-trampo, narkotulino, pastro-hipokritulo. Jesa ne disvastigas speciale bonagojn aŭ miraklojn, ŝi vidas homojn trae, inklinas ilin ŝanĝiĝi. Kompreneble, okazas konflikto inter ŝi kaj urbaj aŭtoritatoj...

*Sergej Lukjanenko.*  
**Kavaliroj de Kvardek**



**Insuloj.** – “Impeto”, 2009. – 224 paĝoj.

Tradukis el la rusa Svetlana Smetanina, Mikaelo Ĉertilov. Redaktis Mikaelo Bronŝtejn, Elena Ŝevĉenko. En la libro debutis juna pentristino Maria Lazareva el Vorkuta.

La aventura romano apartenas al fruaj verkoj de la aŭtoro. La dekkvarjara knabo, Dima, subite trafas en mirindan mondon – la Mondon de Kvardek Insuloj, en kompanion de preskaŭ samaĝuloj el diversaj landoj. Tie li renkontiĝas kun Inga, lia konatino el la Tera vivo. La vivo sur la insuloj evidentiĝas kruela kaj tute ne infaneca. La gejunuloj estas devigataj batali por defendi siajn vivojn kaj la vivojn de siaj nevolaj kunuloj.

Diversmaniere riviĝas iliaj karakteroj kaj agoj. Amo, heroaĵo, amikeco kaj sindonemo najbaras kun perfido, malkuraĝo kaj perforto.



**Rusa-Esperanta biblia frazaro.** – “Impeto”, 2009. – 184 paĝoj.

Kompilis Aleksandr Ŝevĉenko, redaktis Viktor Aroloviĉ.

La vortaro unuigas bibliajn frazojn, renkonteblajn en la rusa literaturo kun ekzemploj el la Malnova Testamento (la klasika traduko de L.Zamenhof) kaj la Nova Testamento. La frazaro ne nur donas tradukojn de la frazoj, sed ankaŭ ebligas iom profundiĝi en la biblian tekston dank’ al ekzemploj kaj pripensi eblajn variantojn de la traduko. La kompilinto kaj la redaktoro dediĉis la libron al la 150-jariĝo de L.L.Zamenhof.

*Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)*